Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado

Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Aŭstrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro JANUARO/FEBRUARO 1950 n-ro 1-2

EN LA NOVAN JARON

La tempo Kristnaska pasis, ĝi kun sia soleno kaj agrablo, kaj intertempe iĝis nova jaro. Jaro atendiganta kaj sopiriganta nin je cirkonstancoj pli prosperaj kaj, kiel oni ordinare diras, pli "felicaj". Pli felicaj ni volas iĝi en tiu ĉi jaro. Kiel en ĉiu jaro, kies sojlon ni transpasis, iluzikonsciaj pri la jaro pasinta kaj esperplenaj pri la jaro sin proponanta. Sed ĉiam embuskis en nia felicosopira koro la praveta timo, ke denove en tiu ĉi nova jaro multaj esperoj sangigos je iluzioj kaj niaj deziroj restos neplenumotaj. Kaj facile ni ĉiam emas kondamni la vivon, la "malican, apenaŭ vivindan". Sed ĉu ni ne eraras, dezirante de la nova jaro agrablon, oportunon, senzorgecon, ĝuon? Ĉu ni ne postulu de ĝi ion aliaŭ, neiluziigeblan, kaj kio ĝi estu do, fine?

Ni ne sopiradu nur ĝuon kaj plezuron, kiuj tiel ofte ne estas atingotaj. Ni agos pli prudente, dezirante de la nova jaro, ke ni povos f a r i n i a n t a s k o n - ludi nian rolon pozitive, tiun rolon, kiun ni kiel individuoj ricevis dote por tiu vivo. Ni sopiradu plenumi la bonajn farojn, je kiuj ni kiel apartaj individuoj estas taŭgigitaj ŝtd niaj talentoj. Ĝuo, felico plej alta por karaktero altnivela estas la konsciiĝo, ke pli kaj pli oni sukcesas plenumi sian pozitivan, individue difinitan vivotaskon. Kaj pro tio ni, asigurante la nunan, novan jaron, ne demandu "Kiom da agrablajoj ĝi alportos por mi?", sed prefere "kion bonan mi sukcesos fari dum ĝi?"

Kaj la plezurego, povi fari nian plejbonon, plenigu nin tute!

Fari nian plejbonon por io pozitiva, malegoisma, signifas samtempe ankaŭ transpreni sur nin ĉiujn sargojn, zorgojn, malplezurojn, kiujn la sorto ligos al tiu devoplenumado. Ni portos ilin senplende: ja ni plenumos nian taskon, kiu sole pravigas antaŭ ni nian moralan ekzistorajton. Kaj tiun ĉi idekoncepton pri la pozitiva rolo, kiun ni povas - d e v a s ludi por nia propra morala kontentigo, tiun ĉi idekoncepton ni proprigu al ni! Ĝi, cetere, ankaŭ havas en si la avantaĝon, ke ni, agante laŭ ĝi, ne devos plendi pri iluzioj - car ja la maloportunajojn ni anticipe enkalkulis. Nur la plenumado de niaj devoj irigas nin sur la vojon, kiu efektive kondukas al la felico. Tiu felico estas garantiita kaj sen iluzioj.

Konsiderante tion, ni Esperantistoj transpasu la sojlon de 1950-a.

Ni kun multaj aliaj devoj komune havas unu eminentan - la daŭrigon kaj sukcesigon de la noblaj aspiradoj de Zamenhof.

Hugo Kraus.

K o m u n i k o j d e l a r e d a k c i o

Karaj geamikoj! Nia amata revuo estas al vi hodiaŭ prezentata en alia, bedaŭrinde ne pli impona sed male ĉ en pli modesta formo. La estraro de nia AEF estis devigita pri tiu sango pro motivo vere konsiderinda: pro la generalaj cirkonstancoj, kiuj ne restis seninfluaj ankaŭ al nia movado. La Federacio tre suferas finance kaj tiu ĉi fakto necesigis cesigi la aperigon de nia organo en la gisnuna maniero. Tamen ni forte esperas, ke esperinde balsaŭ ni povos reveni al la presigo, se per la komunaj fortostrecoj de la aŭstria esperantistaro por plimultigi la membraron de AEF la financa situacio ekhavos fortikan fundamenton.

La nuna aperformo de AER postulas de la redakcio pli severan elekton inter la manuskriptoj, kiujn la ges-anoj bonvole sendas al ni. Ni do petas niajn kontribuantojn, ke ili ne cagreniĝu pro la neapero aŭ prokrasto de unu aŭ alia artikolo, sed helpu al la redakcio kiel antaŭe per sia kunlaboro. Unu promeson la redakcio volas doni: ke gi klopodos aperigi la revuon regule ĉiun duan monaton! Ti=

el oni povos iom egaligi la mankon estiĝintan pro for=
laso de la presigo.

La nova redakcio, reprezentata per la s-anoj Dr Grim=
me, Hugo Kraus, Gustav Loibl kaj Werner, per tiu ĉi nu=
mero transprenas la organon de AEF el la manoj de s- ano
Berdan, kiu kun ĉiam de ĉiu agnoskata kapablo redaktore
vartis ĝin. La nova redakcio taksas lian laboron modela
kaj penos daŭrigi ĝin en lia maniero. Esperante akiri la
fidon de nia satata legantaro kiel li, ni dankas al li
pri lia pionira aktivado.

La redakcio.

NIA MOVADO INTER CIVILIZO KAJ KULTURO

(Parolado de Ernst Werner, sekretario de la Aŭs=
tria Esperanto-Instituto, farita en la "Dua Vie=
na Esperanto-tago", la 23-an de Oktobro 1949).

La nuna stato de la Esperantomovado estas karakteri=
zita per du antagonismaj fenomenoj: kreskanta oficiala
rekono sur diversaj kampoj, ekzemple radio, trafiko, tu=
rismo, posto, instrupermesoj, ekzamenkomisionoj, lektor=
atoj ktp estas sufiĉe konataj.Kaj same ĉiu esperantisto,
kiu partoprenas la movadon, scias,ke la uzo de tiuj ofi=
ciale permesitaj aplikoj de Esperanto estas preskaŭ nula:
La societa vivo malprogresas,la malmultaj anoncitaj kur=
soj estas tre malbone aŭ tute ne vizitataj, la publiko
estas, kvankam ne plu kontraŭema, tamen indiferenta kiel
neniam, kaj ĉiuj klopodoj de propagando aŭ varbado por
Esperanto estas preskaŭ senefikaj.

Kio kulpas?

Certe la stagno, eĉ malprogreso de la movado estas
grandparte efiko de la milito kaj de la postmilitaj cir=
konstancoj, kiuj grave seniluziigis ĉiujn, kiuj kredis,
ke post la militfino sekvos tempo de paco. La plej teru=
raj postlasaĵoj de la milito,kiuj estas multe malpli fa=
cile reboniĝeblaj ol la materiaj ruinoj,estas la dezert=
igitaj kampoj de la anima kulturo: timo, malkonfido kaj
pesimismo estas tro profunde enpremitaj en la sklavigit=
aj animoj, kaj ili ankoraŭ regas plu, sanginte la liber=
an mondon en grandan koncentrejon de homa malliberec kaj
malindeco.

Ankaŭ la oficiala rekono de Esperanto kaj parte eĉ la pliboniĝita publika opinio pri Esperanto estas simptomoj de ĝenerala tendenco: la ŝtattendenca evoluo, kiu - pro timemo, malkuraĝo kaj nesufiĉa respondeco de la individuoj - volas ŝargi pli kaj pli da taskoj, socialaj, politikaj, ekonomiaj kaj fine eĉ kulturaj, sur la anonimajn ŝultrojn de paĉjo "stato". La moderna homo ja ne emas doni monerojn aŭ personajn konsilojn kaj helpojn al mizerulo aŭ invalido, sed montras al ili pli-malpli afable la vojon al la plej proksima oficejo de la koncerna sociala institucio, kiu laŭlege prizorgu ilin - - -

Tia evoluo estas civiliza, sed ne kultura.

Civilizo estas la eksteraj formoj de la kunvivado kaj komunikiĝo de la homoj, precipe en formo de la tekniko, - ekzemple la konstruado de urboj kaj fervojoj, la formiĝo de politikaj partioj kaj ĉiuj aliaj formoj de homa organizado.

Kontraŭe, kulturo estas tuto de internaj, spiritanimaj valoroj kaj per ili formita spirita strukturo de la vivantaro; koncize dirite, la "vivostilo" de la vivkomunumo (gento, nacio aŭ klaso). - Inter la faktoroj de la kulturo la plej gravan rolon havas la lingvo kiel la bazo kaj centro de la fizikopsikaj fortoj de la homo. Tial la literaturo estas la plej grava mezurilo por la kulturo de iu popolo. Krom la lingvo la kulturo konsistas el jenaj fenomenoj de la tiel nomita "objektiva spirito": artoj, sciencoj, religio kaj moro, edukado kaj lerneja instruado. En ili, generale sub la influo de certa mondrigardo, esprimiĝas la liberaj fortoj de la homa spirito en karakterizaj formoj.

Inter civilizo kaj kulturo estas certaj rilatoj. Vere la kulturo ne dependas de la grado de la civilizo, sed ĝi devas esti iel konforma al ĝi. Kulturfenomenoj troviĝas en ĉiuj epokoj de la homara historio. Jam en la pratempo, kiam la prahomoj ankoraŭ vivis nur de ĉasado kaj ankoraŭ ne havis vestojn kaj domojn, jam tiam troviĝis signoj de la homa kulturo per desegnajoj sur rokomuroj kaj ornamajoj en tomboj. Poste, en la antikva epoko, la granda kulturo de la grekoj kun la ankoraŭ rekonata principo "mens sana en korpo sana" kreis fruktodonan bazon por la tuta eŭropa kulturo. En la mezepoko la kulturo de nia re-

giono estis stampita de religiaj ideoj kaj esprimiĝis en artaj formoj, kiuj estis konvenaj al la pensado kaj la civilizaj formoj de la tiama tempo.

Nur depost iom ol 100 jaroj, de kiam la tekniko komenciĝis evolui, la rilato inter civilizo kaj kulturo sanĝiĝis. La civilizo rapide evoluis kaj fariĝis internacia, sed la kulturo ne povis sekvi kaj restis en la malnovaj naciaj formoj. Ĉar la intelekto povas relative rapide elpensi novajn aparatojn, sed la animaj fortoj (sentado, kutimoj, deziroj kaj volado) ne povas sekvi same rapide; ili bezonas pli da tempo por adaptiĝi. El tio estiĝas la granda kaj tragika malkonkordo de nia epoko, kiu minacas pereigi la mondon: supera civilizo senkultura, aŭ kulturo postrestinta en formoj jam delonge forlasitaj de la civiliza evoluo.

Kial ni devas fari tiun ĉi malfieran konstaton? Kio mankas al ni por havi konvenan kulturon?

La cefaj kondiĉoj de la kulturo estas: 1) certigita vivo, 2) libertempo kaj anima ekvilibro, 3) vera libereco de la spirita evoluo kaj 4) kreemo el neelĉerpitaj spiritaj fortoj. Sklavoj kaj mizeruloj neniam havis kulturon, nek la tipaj modernuloj, kiuj ciam "ne havas tempon".

Kulturo povas kreski nur en libereco kaj nur tre malrapide, kiel ne sercita floro el la fruktodona grundo de la germantaj spiritaj fortoj. Kulturan vivon oni ne povas eldevigi, same kiel oni ne povas devigi la florojn, evoluigi belajn kolorojn. Tiuj, kiuj volas senpacience reflorigi kulturon sur la nuna, ankaŭ civilize ruinigita tero, similas al ĝardenisto, kiu volus sur dezerto plibeligi la tro palajn rozojn per kolorigiloj. Antaŭe ni nepre devas pene rekulturi la grundon. Ja ne hazarde la vorto "kulturo" devenas de la origina senco, laŭ kiu ĝi signifas prilaboradon de la tero.

Ankaŭ la kulturmovado de Esperanto kondiĉas jam iometete kulturitan grundon animan; nur tiam ĝi povas fariĝi la kultura fundamento sur la internacia civilizo, povas prepari kaj konstruadi internacian kulturon. Ni esperantistoj eĉ estas konvinkitaj, ke ĝi estas la sola taŭga rimedo por tio.

Esperanto homigas la mondrigardon kaj povas revivigi ankaŭ la arto-kreemon sur nova bazo ;- ĝi kreas senton de

homara solidareco "sur neŭtrala lingva fundamento"; - ĝi povas kontribui al nova, superkonfesia religio, laŭ larganima Zamenhofa percepto en la "prego sub la verda standardo"; - ĝi povas akceli internaciajn morojn kaj humanajn kutimojn kaj ĝi fine povas fundamentigi vere humanan edukadon kaj instruadon de ĉiuj popoloj.

Sed ĉi-tio nur je unu kondiĉo: ke ni mem uzas Esperanton ĉefe kiel kulturrimedon kaj ne sole kiel lingvo-peran ilon de la civilizo. Turismaj kaj fremdultrafikaj arangoj per Esperanto estas bonaj, sed ili ne sufiĉas; ili estas nur premisoj por la pli valora uzo de Esperanto por kulturaj celoj. Tial ni ne atendu tro multe de sole organizaj klopodoj aŭ de la helpo de la granduloj de la mondo. Kulturan movadon oni ne povas estigi aŭ plifortigi per dekretoj. Eĉ la generala enkonduko de Esperanto en la lernejojn de ĉiuj statoj ne vere alvenigus jam la celon de nia movado, se ne kultura lernemo de la popoloj donus al ĝi fruktigan bazon kaj ŝirman tegmenton por la kultura konstruajo de la estonteco.

Aŭstrio estas certe speciale destinita esti ponto inter la popoloj. Kaj same kiel Polujo, kie nia Majstro envivigis la lingvon internacian, situas en kultura mezo inter okcidento kaj oriento, same Aŭstrio povus farigi la nova organismo de la unuigitaj popoloj.

Ni do fervore repreparu la grundon, plibonigante kvaliton kaj kvanton de nia movado el niaj internaj fontoj. Ĉar nur forta popolmovado, en kiu granda ideo vivas kaj komuna sento pulsas, povas "pason post paso, post longa laboro" fine venki kaj konkeri la mondon. En la tempo de malfacilega transiro de la naciismoj al la mond-federalismo Esperanto certe estas taŭga kaj grava kulturfaktoro. Sed nur tia Esperanto, kia vere vivas en la kapoj kaj koroj de multaj adeptoj en ĉiuj landoj, montrante tiel per modelaj faktoj mondon pli bonan, la estontan mondon de la homara kulturo. -

LA ĈARMULINO

Hodiaŭ mi veturis en la tremo kaj diskrete observis la pasaĝerojn.

Jen, je la dua haltejo envagonigis juna, belaspekta ĉarmulino. Helblonda kun ruĝe florantaj lipoj kaj sube

kun du kruroj, kiuj laŭ la konata diro: "kunfluigas la akvon en la viraj busoj". Ŝi laŭvere aspektis tiel, ke mi ne sciis: ĉu naiva ĉu - vampira.

Do, ŝi caste eksidis, neforgesinte glitigi antaŭe sian rigardon tra la tuta vagono. Poste ŝi malfermis la portujon, elprenis speguleton, fermis la portujon, malfermis la speguleton kaj ordigis sian hararon, kiu, laŭ mia opinio, estis tute en ordo kaj desegnis icmete sub la nazo.

Fine ŝi fermis la speguleton, malfermis la portujon, enmetis la speguleton kaj fermis la portujon.

Sed nun venis la konduktoro kaj petis pro la bileto. Ŝi malfermis la portujon, elprenis la monujon, fermis la portujon, malfermis la monujon, elprenis unu silingon, fermis la monujon, malfermis la portujon, enmetis la monujon, fermis la portujon kaj aĉetis bileton. Ricevinte la bileton kaj la restajn monerojn, ŝi malfermis la portujon, elprenis la monujon, fermis la portujon, malfermis la monujon, malfermis la portujon, enmetis la monujon kaj fermis la portujon.

Mi ekspiris. Sed nun proksimiĝis la kontrolisto .... kaj la belulino malfermis la portujon, elmetis la monujon -- Feliĉe mi jam alvenis ĉe mia haltejo kaj devis elvagoniĝi. Mi diris "feliĉe", ĉar mi jam komencis mediti pri eventualaj kondiĉaj rilatoj inter la loga ekstarejo de la ĉarmulino kaj sia neaktiva intelekto.

Robert Novaĉek.

LA KVARA AUSTRIA ESPERANTO-KONGRESO EN VIENO 1950

Ĉiu samideano, partoprenint la ĝisnunajn aŭstriajn kongresojn, certe kun kontentigo kaj gojo rememoras la belajn tagojn en Kufstein, en Linz kaj en Graz kaj sopiras jam nun la estontan kongreson en Vieno.

Kial la kongresoj tiom gojigas la samideanojn? Dum la komunaj kongresoj ĉiu partoprenint videble spertis, ke la interna ideo esperantista efikoplene efektivigas, indulgemo kaj interkonsentemo regas la korojn. Krome, tia kongreso plejbone videbligas al la cetera homaro, al la mondo, ke ni nepre postulas la pacon, ni deziras la amikan interkonsenton kun ĉiuj popoloj. Per tiaj kongresoj laŭte vokas la mondon: "Potenculoj, eminentuloj, regist-

raranoj, estraranoj aŭskultu nin kaj obeu nian postulon: pacon ni deziras, sinceran, veran, honestan pacon". Ni venkos, ni konkeros la mondon per nia interna ideo, heredita de nia majstro, sub la sankta signo de l' espero.

Do, karaj gesamideanoj, jam nun ni komencu la antaŭlaborojn por pretigi la kongreson en Vieno. Mi vokas ĉiujn gesamideanojn laŭeble kunhelpi, ĉiu strecu sian fortON kaj dediĉu sian kapablecon al la komuna celo, por ke ankaŭ la ĉi-jara kongreso bone sukcesu!

Por la loka kongresa komitato
O. Sinner, prezidanto.

La kvara Aŭstria Esperanto-kongreso okazos je Pentekosto, la 27an gis 30an de Majo 1950.
Kongresadreso: Esperanto-Centro, Wien I., Neutorgasse 9. Postcekkonto nro 183.874, Oesterr. Esperantistenverband.
Kotizo: Por obligi al ĉiu aŭstria samideano la viziton de la "Aŭstria Esperanto-kongreso - 1950" en Vieno fiksis la L.K.K. la kongres-kotizon jene:
S 10.-- por kongresantoj,
S 15.-- por kongres-akcelantoj,
S 8.-- por familianoj.
Eksterlandaj kongresanoj ne bezonas pagi kongreskotizon. Ili estu niaj karaj gastoj.
La L.K.K. esperas, ke ĉiu samideano, kiu finance povas akceli la kongres-arangon, komprenante la malfacilan financan situacion de la movado, nepre aligu kiel "kongres-akcelanto".
La L.K.K. petas jam nun la estrarojn de la ekstervienaj Esperanto-societoj arangi kotiz-vojag-kasojn por obligi al kiom eble plej multaj gesamideanoj la partoprenon al la kongreso. Estas ankaŭ petate informi la L.K.K. pri la nombro de la gesamideanoj, kiuj intencas viziti la "A.E.K. - 1950".
Postkongresa restado laŭ anonco estas ebla.
Logaj distraj vesperoj precipe por la junularo estas en preparo.

* * *

Portu ĉiam la verdan stelon!

LA ESPERANTOMOVADO EN AUSTRIO

VIENO: Plej grava okazaĵo de la raporta periodo en Vieno estis la ĉi-jara 2-a Viena Esperanto-Tago. Aktivuloj el ĉiuj grupoj estis kunhelpintaj por kompili amuzan programon: Sabate, la 22-an de Oktobro je la 15-a malfermis ĝin varbo- kaj fotoekspozicio de sano KATZIANKA; prezidanto VOKAL petis nian federacian honorprezidanton sekcian cefon d-ron DWORSCHAK, generalan direktoron de la aŭstria posto, pri lia alparolado. Li diris inter alio:

"Niaj modernaj informiloj pliproksimigas la homojn. La problemo de mondhelplingvo laŭ tio de jaro al jaro pliaktualigas. Kio estus pli komprenebla ol ke mi portos la ideon pri ĝia necesо en la vicojn de la poŝtoficistaro? Ĉe la ĝiĉetoj, en la aŭtobuso la Esperanton scianta dejoristo povas esti bona helpanto al ĉiu fremdulo, kiu same estas ano de la mondlingvo. Per la Esperanto -poŝtmarko simbioze kunigis du ideoj, kiuj ambaŭ aspiras la saman paceman celon. La E-poŝtmarko, migranta en la tuta mondo kun la poŝtaĵoj trans ĉiujn limojn, varbas por la lingvo, kiu ebligu al ĉiuj homoj, kiuj logas malantaŭ tiuj limoj kaj parolas fremdajn lingvojn, ke ili komprenu kaj ekkonu sin reciproke. Mi do volas al vi, kiuj same kiel mi klopodadas akceli la ideon de popolfratiga, unueca lingvo, kiun Esperanto tiel perfekte prezentas, promesi, ke mi laŭeble subtenos la aŭstriajn esperantistojn en ilia laboro". Aliginte al siaj nekrologaj vortoj pri la konata pioniro kalk.kons. FREY sian personan dankon, s-ano d-ro Dworschak finis sian multaklamitan paroladon.

Ekministro d-ro FRENZEL, prezidanto de AEF, donis revuan raporton pri la Esperanta laboro en nia lando. Li petis la samcelanojn pri plua harmoniakaj celkonscia kunlaborado kaj menciis, ke ĉiu akcelu la laboron de la estaraj aktive per konsiloj, proponoj kaj speciale per aktiva kunlaboro kaj regula pago de la kotizo. Ni tiam atingos certe pluajn, gravajn sukcesojn.

Pri siaj personaj impresoj dum la nunjaraj kongresoj interese parolis s-anoj KATIANKA (UEA), Gustav LOIBL (SAT), ZINK (fervojista kongr. Aarhus), CECH (Graz), SINNER (pri A.E.K. 1950 en Vieno), POLZER (italia), BARTEK (junulara renkonto en Svedio).

Tuta aro da ges-anoj montris siajn fervoron kaj kapablon, muzikante kaj aktorante en gajaj skeĉoj dum la sekvinta amuzvespero. Esperanta kulturfesto unuigis la postan tagon matene la Vienan s-anaron en la granda salono de la fervoja direkcio. La arangintoj - la fervojista grupo de AEF - ofertis sub la gvido de la aktiva s-ano ZINK varian distron. Alternis infanbaledoj, recitoj, akordeonludoj kaj kantoj, dum kiuj eminentis kiel gasto s-ano LORENZO el Vorarlberg. Lumbildparolado pri Italio, lando de la postjara SAT-kongreso, kaj precipe la sagaca parolado de s-ano WERNER pri la nuna stato de nia movado (vidu la artikolon en tiu ĉi n-ro! Red.) estas mencindaj.

Posttagneze finis ekskurso la sukcesan arangon de la Viena Esperanto-Delegitaro.

El la protokoloj de la VED-kunsidoj ni ĉerpas jenajn informojn: La Vienaj ges-anoj gaatigis 30 ges-anojn el Danio, kiuj estis akceptitaj de la urbestro. D-ro Körner tre favora al la internacia lingvo, vidinte belan prospekton de Kopenhagen, iniciatis por la aŭstria E-kongreso 1950 eldonon de simila prospekto pri Vieno. - S-ano KONECNY, la instruista aktivulo en Vieno, anoncis gvidadon de du kursoj en ĉeflernejo por knaboj. En unu klaso partoprenas ciuj lernantoj kaj en la dua de 31 dudekunu. - Sub gvido de sia estro FINKENZELLER la esp-istaj naturamikoj propagandis per flugfolioj dum la internacia naturamika tago. - S-ano CECH informis pri grava sukceso: estos ekde nun eble, disponigi Esperantajn informojn al la presa propaganda servo de la ministerio por internaj aferoj. - Laŭ informoj al la redakcio aperis por- kaj priesperantaj publikigoj en jenaj gazetoj: sindikata gazeto "Post und Telegraphie", la eklezia "Kirchenblatt der Wiener" kaj "Wiener Bote", bulteno de la Naturamikoj.

STIRIO: Kompletige al la raporto pri la Graz-a kongreso de AEF la stiriaj s-anoj sendis al ni jenan sciigon. Dum la ĉeesto de gravaj reprezentantoj de la stiria landa registaro kaj de la Graz-a urbestraro okazis la 17 an de Julio en la fama "Jeanäum" la malfermo de la "Kongresa E-ekspozicio", kiun partoprenis multnombra kongresanaro. Specialan meriton havas landa bibliotekestro, s-ano d-ro FRIEDL, kiu arangis la ekspozicion kaj gvidis la

vizitantojn, klarigante al ili per ekspoziciaĵoj la evo= luon dela movado kaj la prakikan uzeblecon de Esperanto.. S-ano d-ro ZIEGLER, prezidanto de la Germana E-Asocio, ĉe estis la kongreson kaj dokumentis la seton de nia organ= izo kaj ties agado flanke de GEA. Aparte mencinda ankaŭ estis la laŭdinda kunagado de la s-anaj geartistoj, kiuj beligis la kongresarangoĵn. La unika kaj vere aminda kant= istino s-ino Marguerite SANTREUIL entuziasmigis ĉiujn. La atendinda basisto s-ano LORENZO, kiu pruvigis cetere kiel lerta tradukanto de kantoj kaj arioj, rikoltis same dan= kon de la ges-anoj. La simpatio de la dankemaj stiriaj esperantistoj rekomendas ambaŭ s-anojn geartistojn al la artemaj Esperanto-rondoj.

Cirkulero n-ro 6 de la landestraro por Stirio de AEF sciigas pri la sukceso, ke Landesverkehrsamt für Steier= mark (landa oficejo por varbado de turistoj al Stirio), Graz, Herrengasse 16, uzas Esperanton; oficas s-ano EDER. Dum internacia ekspozicio de afiŝoj, okazonta printempe 1950, Esperanto havos apartan standon. Oni petas pri al= sendo de varia varbmaterialo!

Cirkulero n-ro 7 konigas E-grupojn en jenaj lokoj: Bruck / Mur, Deutschlandsberg, Graz (3), Hartberg, Hart= mannsdorf-Ottendorf ĉe Gleisdorf, Ilz, Kapfenberg, Kirch= bach, Tobisegg, Knittelfeld, Leoben, Liezen, Pischels= dorf, Voitsberg-Köflach, Weiz kaj Zeltweg.

SALZBURG: Interligilo nro 3 informas pri la gastema ak= cepto de la dana karavano en Salzburg. Forve= turonte tra la belegaj regionoj de Hallein, Pass Lueg, Bischofshofen, Tell am See, Saalfelden, Lofer, St. Jo = hann in Tirol al Kufstein, la gastoj promesis, ke en 1950 ili revenos al Salzburg kaj Tirolo.

Kursoj okazas en Salzburg (Fötinger, Hochey, Seligo, d-ro Christanell), Bischofshofen (Laukes) kaj Saalfelden (Oberlechner).

TIROLO MODELE AKTIVA.

La Zamenhofa spirito en Landeck. Gesanoj HILKERS= BERGER, la ideologiaj animoj de la Landeck-a movado, per siaj idealismo kaj oferemo kaj nelacigebla fervoro estis kreintaj miraklejon internacie konatan, al kiu la Zamen=

hofanoj, sopirantaj travivi la atmosferon de la Interna Ideo, jam nun pilgrimas are al la belega montara regiono de Landeck. Amiko Hilkersberger sendis al ni raporton,el kiu ni ekstraktas jenon: "Fine de Julio vizitis nin gekdoj KRAUTSCHNEIDER el Vieno. Ili en vere Zamenhofa maniero kunhelpis finila laborojn porla feria hejmo FRATABO, por ke la dometo estu gustatempe preta por akcepti la unuajn gastojn. Ankaŭ 4 s-anoj el Torino venis aŭtomobile por viziti nin dum 2 tagoj kaj ili gojis pri la bona akcepto ĉi tie. La 2an de Aŭgusto alvenis 16 francaj junuloj kun sia lerneja direktoro, s-ro LE SAGE kaj edzino.La junuloj, kiuj jam dum 1 jaro estis korespondintaj kun la geanoj de la Verda Junularo de Landeck,sufiĉe povis komprenigi sin reciproke.La 5an de Aŭgusto okazis salutvespero en la feria hejmo FRATARO. Ĉeestis la franca gubernestro, s-ro WOYTT kaj kapitano s-ro MEISTERHEIM. Esperantaj,francaj kaj tirolaj kantoj beligis la vesperon. Precipe la franca junularo plaĉis per siaj kvarvocaj ĥorprezentadoj. La gubernestro en sia salutparolado parolis kuraĝigajn vortojn por la esperantista ideo,kiu kapablas kunigi la homojn kaj naciojn. La 6-an de Aŭgusto okazis inaŭgurfesto de la feria hejmo FRATARO. La festparoladon faris s-ano ZINK el Vieno.Estis inter ni ankaŭ delegitoj de la aŭstriaj liglandoj.Partoprenis fervojistaj kolegoj el Germanio kaj Italio kaj eksprezidanto de la Italia E-Asocio s-ano CLAVENNA. Poeman parolludon, nomitan "Fratraro", de kolego RAMSCHAK, Villach, deklamis 3 s-anoj

Posttagmeze okazis en la fervojista sindikatejo ekstera ordinara fakkunsido de la fervojista fakgrupo.Tiu ĉi donacis 300 silingojn por la Esperanta hejmo, kiu servos, kiel feria hejmo por la fakkolegoj en- kaj eksterlandaj, kiuj volas modeste pasigi feriojn en Tirolo. Vespere finis muziko kaj danco la rimarkindan tagon.

Kelkajn tagojn poste vizitis nin ankoraŭ ges-anoj LOIBEL el Vieno, venintc el Parizo. La 13-an de Aŭgusto alvenis 24 nederlandaj naturamikoj, gvidata de la instruistoj RANT kaj BRAKENSIEK. En la sama tagola dometo FRATARO denove travivis emocian feston de interfratigo. 24 nederlandanoj, 3 francaj s-aninoj kaj 16 francaj junuloj kaj ties geinstruistoj, kunigitaj kun la ges- anoj de la loka grupo ESPERO kaj ne-esperantistaj gastoj dum kelkaj

horoj intimiĝis kun la Zamenhofa spirito. La ges-anoj el Nederlando donacis al la feria hejmo valoran, arte pentritan bildon de sia hejmloko kaj unu s-ano donacis tri belajn E-librojn kiel fondaĵon por biblioteko de FRATARO La virinoj de la nederlanda karavano transdonis praktikajn ilojn por la mastrumado. La "Saluton al la Esperanta Hejmo", verkitan de s-ano MUDRAK, Vieno, deklamis knabino el la Verda Junularo. Violon- kaj akordeonmuziko tutigis la belecon de la festo."

Ni kore gratulas al la Landeck-aj geamikoj pro ilia pionira agado kaj deziras al ili multan gojon sur la vojo de Zamenhof. Ni esperas, ke la subtenintoj de la FRATARO-dometo trovos multajn imitantojn! Ges-roj Kraus el Vieno, kies filineton ges-anoj Hikersberger gastigis dum 2 monatoj, petis nin, esprimi al tiuj altruismaj esperantistaj geedzoj ilian sinceran dankon!

Floras la movado sub estrado de s-ano Hans Steiner.

La Tirola Esperanto-Renkonto (21.8.49) en Innsbruck kunigis ĉ. 120 partoprenintojn, inter ili delegitojn el ĉiuj grupoj de Tirolo kaj Vorarlberg, eminetuloj el Innsbruck kaj gazetraportisto de "Tiroler Nachrichten". Granda, tre gojiga surprizo estis la partopreno de geesperantistoj el entute 7 nacioj, inter ili dro Ziegler, prez. de GEA kaj s-ro Liechti, prez. de Svisa E-Societo. Okazis la elekto de la nova landestraro por Tirolo kaj Vorarlberg (Estro Hans Steiner, vicestro Josef Erlacher, sekretario Hans Spiess, kasisto Karl Scheiflinger). - Aŭstria Junulara Ruga Kruco laŭ dankinda iniciato de s- ano Rolf HAUSER, E-estrarano, oficiale akceptis E en la edukprogramo. - Laŭ peto kun aldonita afranko Tirola landa trafik-oficejo dissendas senpage novajn faldprospektojn kaj flugfoliojn. - Grupfondon la "Informleteroj" anoncas en Brixen im Tale (Lauterbach, estro Peter AUER, ĉe kiu ankaŭ estas ricevebla faldprospekto germanlingva kun E-a aldono) kaj en Jenbach ("Gaja Bondo", estro Fritz SCHWEIGER). Ni kore gratulas la novajn grupojn!

La UNUAJ ŜTATAJ EKZAMENOJ EN INNSBRUCK okazis la 4an de Oktobro. Ĉiuj 7 gekandidatoj sukcesis, du eĉ kun distingo (f-ino AICHER kaj s-ino RAINER). Speciale menciindaj estas la kandidatoj Karl KOLLER, 64jara s-ano kaj s-ano Ambrŏs STŎCKL, kiu havas la privilegion, esti la

unua instruisto en Tirolo kun ŝtata E-ekzameno.La redakcio kun plezuro aligas al la gratuloj de la tirola landestraro! - "Cosmopolit",organo de la "Mondcivitanoj" enhavos 2 paĝojn en Esperanto. Kontribuojn sendu al s-ano H.Steiner, Kirchbichl! - Tutmonda Junular-Oraganizo kongresos 1951 laŭ invito de la urbo en Kufstein.

LABORISTA ESPERANTISTARO

La 13an de Oktobro okazis en la E-grupo "Kaloscaj-Laboro" la kunveno de la laboristaj esperantistoj,kiu estis vizitata de 50 ges-anoj. Parolis k-do N. Hovorka pri siaj impresoj ĉe la packongreso Moskvo. Oni ankaŭ montris per lumbildoj vidindaĵojn de Moskvo, inter ili la modernan suburban fervojon.

Pri la Esperanto-Tago de Malsupra Aŭstrio en St. Pölten skribis k-do Balague en la fabrika gazeto "Turbine" de la Voith-Fabriko artikolon favore al Esperanto, instigante la laboristaron lerni nian lingvon.

Ĉiun unuan merkredon en la monato la "Verda Stacio" sendas 45minutan artan programon sur ondoj 269m,325m,259m kaj 219m je la 23.15 horo. - Skribu dankleteron aŭ postkarton al "Verda Stacio", Praha XII. Stalinova 12. ČSR.

Radio Sofio sendas ciutage Esperante sur mallonga ondo de 39.11m je la 20.00 horo en daŭro de 15 minutoj.

SOCIALISTA ESPERANTISTARO

La "Socialista Esperantistaro" okaze de la aŭstriaj balotoj aranĝis en Vieno kunvenegon, en kiu k-do urbkonsilanto J o n a s esperantlingve paroladis.Li priparolis la dependecon de la kultura vivo de la libereco kaj konkludis, ke nur en demokrata libera ŝtato la vera kulturo povas prosperi. Estis versajne la unua fojo, ke balotkandidato al urbkonsilistaro paroladis esperantlingve petante doni la balotilon al sia partio.

La grupo "Nia Vojo" en Vieno XVI nun kunvenas ĉiuvendrede inter la 19a gis 21a en la Laborista Hejmo, Vieno XVI. Schuhmeierplatz 18,Ia etago.

*** NE FORGESU LA LIBROŜPARADON DE AEF! ***

KATOLIKA ESPERANTISTA VIVO

La katolikaj ges-anoj en Vieno kunvenas ĉiun 2-an kaj 4an mardon de la monato inter la 17a - 19a horo en Kreuzbundheim, WienI., Graben 13/II/II25. Samloke okazas ĉiumarde je la 19-a kurso por komencantoj. Ĉiun merkredon je 19 kaj 1/2 kurso en la paroĥo "hl. Geist" en Wien XVI.

Adreso de AKLE-grupo Salzburg: Pastro J. Kaps, kadetrala vikaro, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7.

En kadro de la s a n k t a j a r o 1950 okazos la XXIIa Internacia Katolika Esperantokongreso de la 10a - 17a de Aŭgusto en Romo. Kongresa adreso: P.Prf. Modesto Carolfi O.F.M., Pontificio Ateneo Antoniano 124, Via merulana, Romo. Kotizo liroj 500 (kunfamilianoj 250). Aliĝo rekte aŭ per AKLE-Wien.

FERVOJISTA FAKGRUPO

Nekrologo: La 27an de Septembro 1949 mortis nia tre ŝatata amiko kaj kolego Josef K i r c h m a y e r. La fakgrupo perdis unu ella plej sinceraj kaj sindonemaj membroj. Antaŭ unu jaro la mortinto fondis en Ofterding, Supra Aŭstrio, la viglan Esperantogrupon "Paca Vilago". Liaj gefiloj parolas Esperanton kaj promesis, daŭrigi la komencitan verkon de la kara paĉjo. La fervojista fakgrupo esprimas al la familio Kirchmayer sian plej profundan kondolencon kaj al la mortinto daŭran memoron.

2-a KONGRESO DE I.F.E.F.

La 2-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso de I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperantista Federacio) okazos de la 17-a ĝis 21-a de Majo 1950 en Salzburg, Aŭstrio.

Karaj gekolegoj! bonvolu noti la daton, zorgu por la necesa libertempo kaj komencu jam nun ŝpari monon, por ke vi povu partopreni la kongreson. Detaloj sekvos.

La Organiza Kongres-Komitato.

(Al la Esperanta gazetaro:
Bonvolu represi tiun informon!)

En la Esperanto-eldonejo

"T R A M O N D O"

Vieno I., Neutorgasse 9

aperis jenaj Esperanto-libroj: ĝis

Handwörterbuch Esperanto - Deutsch	7.--
Deutsch - Esperanto Handwörterbuch, 354 Seiten	20.--
"Senhalte al la celo", legolibreto de A. Norbert	3.50
"La mondopaco kiel psikologia problemo" de Hans Thirring, tradukita de Hugo Sirk	2.--
"Tri majstronoveloj" de Stifter, Storm, Kleist, tradukitaj de E. Pebe.	3.--
"Freude durch Esperanto", lernolibro de Hugo Steiner	5.--
Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes (AEI.)	6.--

Riceveblaj estas ankaŭ ĉiuj aliaj Esperantaj kaj germanlingvaj libroj. Mendu rekte ĉe TRAMONDO aŭ per la grupo.

* * *

NOTU LA NOVAN TELEFONNUMERON DE LA ESPERANTO-CENTRO KAJ DE "TRAMONDO": U 23-1-80.

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche: Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a.